Tiaj efikoj tamen iom post iom povis esti mastritaj per pli taŭgaj procesoj, kun kiuj nun estas ofertata du-ŝtupa koncepto dum la kontrolado de nutraĵo por penicilinrestaĵoj, kiuj konsideras kaj la ekonomian aspekton kaj la precizecon de la kontrolo de plej altaj restaĵkvantoj kaj aliaj limoj.

La unua ŝtupo (per la mikrobiologia inhibado) permesas ekzameni tre grandan nombron da specimenoj kun minimuma personara kaj ilara elspezoj. Nur la inhibopozitivaj specimenoj atingas dum dua ŝtupo la identigon kaj kvantigon de la antibiotiko (per ĥemia analizo) al laŭspecia kaj laŭkvanta identigo.


### Resumo

La diskuto pri la problemoj post antibiotika terapio de buĉitaj bestoj estas kaj restas grava por la laŭleĝa nutraĵkontrolo. Speciale rolas la ekzakta determino de penicilin-restaĵoj en lakto kaj viando por la nutraĵindustrio.


### Literaturo


*Pear's Medical Encyclopaedia: Penicillin. Pelham Books Ltd. London,* 1977, p. 440

*Petz M. & Meetchen U.: Penicillin in Lebensmitteln. „Forschung": Mitteilungen der DFG* 3/1991, 16-17


### Adreso de la aŭtoro


*Prof. Dr. R. Sachs*
*Vor dem Brückentor 3*
*DE – 37269 – Eschwege*
GERMANIO

<ISAESachs@aol.com>


### Priaŭtora informo

Sendita de la germana Ministerio pri Evoluhelpo, la aŭtoro instruis (en la jaroj 1967 ĝis 1969) viand-ekzamenon kaj nutraĵ-kontrolon kiel gastdocento ĉe la Veterinara Fakultato de Universitato Najrobo/Kenjo.



# Stefano la Granda – 500 jarojn post la morto

*Doru NEAGU*

### Enkonduko

"Tiu vojevodo Stefano estis homo malaltstatura, tamen kolerema kaj rapideme verŝanta homan sangon. Plurfoje dum festenoj li mortigis homojn senprocese. Malgraŭ tio li estis normala viro, ne mallaborema, kaj li sciis plenumi sian devon kaj kie oni ne pensis, ke li estas, tie oni lin trovis. En batalo granda majstro [li estis] kaj kie aperis danĝero, tie li mem aperis por ke liaj subuloj, lin vidante, tuj ekbatalu pli brave, kaj tial malofte li malvenkis en milito. Kaj eĉ se aliaj lin venkis, li ne perdis la esperon, ĉar venkite li levis sin super siajn kontraŭulojn." Tiel *Grigore Ureche* (*Ureke*), la unua granda rumanlingva kronikisto, en „La kroniko de la Lando de Moldavio" [1] prezentis la personecon de la plej fama el la moldavaj princoj.

Stefano la Granda apartenis al la malnova princa dinastio de Moldavio (kies fondintoj kreis la moldavan ŝtaton mem). Li regis seninterrompe dum 47 jaroj (1457-1504), kiu estas la plej longa princregado en la historio de la lando.

### Enlanda politiko

Sian enlandan politikon la posteuloj registris kiel ĝenerale stabilan dum tiu malstabila epoko. La komerco floris kaj multaj negocistoj venis laŭlonge de la „moldava vojo", liganta tiutempe la Baltan kaj la Nigran Marojn. Pluraj komercaj privilegioj estis eldonitaj por komercistoj el Pollando kaj Hungario. La negoco alportis sufiĉe grandajn enspezojn, permesantajn ampleksan konstrulaboron.

---

[1] *Grigore URECHE, „Letopisețul Țării Moldovei",* eld. *P.P.Panaitescu, București* [Bukareŝto], 1987, p.64.

Princaj kortegoj aperis en Suĉavo (*Suceava*), Jasio (*Iaşi*), *Hîrlău*, *Bacău*, Romanurbo (*Roman*). Tiu ĉi konstrulaboro estis aparte ampleksa. „Neniu el la princoj de Moldavio" – skribis la historiisto *C.C. Giurescu* [Ĝuresku] – „konstruigis tiom da preĝejoj kiom Stefano. Laŭ la tradicio, post ĉiu batalo li konstruigis preĝejon aŭ monaĥejon [...]. Tiom multnombraj estis liaj religiaj konstruaĵoj [...], ke la popolo atribuis al tiu ĉi religiema vojevodo ĉiun malnovan religian konstruaĵon pri kiu oni ne sciis la daton de ĝia konstruado." [2] Tiam oni konstruis la monaĥejojn de *Putna* (1466-1469) kaj *Volovăţ* [elparolo: Volovac] (1500-1502), oni riparis aŭ rekonstruis tiujn de *Neamţ* [Njamc] (1497) [3], *Bistriţa* [Bistrica, 1498], *Voroneţ* [Voronec, 1488], *Tazlău* (1496-1497), *Dobrovăţ* [Dobrovac, 2 monaĥejoj, 1499 kaj 1503-1504]. Grandajn donacojn li faris al la monaĥejoj de *Moldoviţa* [Moldovica], *Pobrata* kaj *Humor*.

Tre multnombras la preĝejoj tiam konstruitaj - preskaŭ ĉiuj en la lasta periodo de lia regado. Ni menciu nur tiujn el *Pătrăuţi* [Patrauc, 1487], *Bădăuţi* [Badauc, 1487], *Vaslui* [Vasluj, 1490], *Iaşi* [Jazio: Sankta Nikolao, 1491-1493], *Hîrlău* (Sankta Georgo, 1492), Borzeŝto [*Borzeşti*, elp. Borzeŝtj, 1493-1494], Dorohojo [*Dorohoi*, elp. Dorohoj: Sankta Nikolao, 1495], *Huşi* [Huŝ, 1495], *Războieni* (1496), *Piatra* [Pjatra] (Sankta Johano la Baptisto, 1497-1498), *Reuseni* (1503).

Li apogis la ortodoksan eklezion ankaŭ eksterlande: preĝejojn oni konstruis en Transilvanio (*Vad*, ĉe la rivero Someŝo) kaj Valakio (*Râmnicu Sărat*) kaj grandan helpon oni donis plurfoje (1471, 1475, 1495, 1500-1501) al la monaĥejo *Zografos* de la *Athos*-monto.

[2] *Constantin C. GIURESCU, „Istoria românilor, II: De la Mircea cel Bătrân şi Alexandru cel Bun la Mihai Viteazul"* [„Historio de l' rumanoj, II: De Mirĉo la Olda kaj Aleksandro la Bona ĝis Miĥaelo la Brava"], *Bucureşti*, 2000, p.67.

[3] Laŭ iuj opinioj tiu monaĥejo „kronis la moldavan stilon de la epoko de Stefano la Granda" – *Marcel D. POPA, Nicolae STOICESCU, „Epoque médiévale"*, en: *„Histoire chronologique de la Roumanie" sous la redaction de Constantin C. Giurescu, Bucarest*, 1976, p.103 (vd. de la samaj, *„Medieval History"*, en: *„Chronological History of Romania" under the guidance of Constantin C. Giurescu, second edition revised and enlarged, Bucharest*, 1974, p.103).



**Eksterlanda politiko**

Dum lia epoko, Moldavio iĝis grava ŝtato ĉe la Malsupra Danubo kaj la Nigra Maro. Pluraj civitoj defendis la tutan landon: *Neamţ* [*Njamc*], Suĉavo [*Suceava*], Hotino, Orhejo [*Orhei*], Kilio [*Chilia*], Blanka Civito (*Cetatea Albă*, hodiaŭ: *Bjelgorod Dnestrovskij*). Tiam estis ankaŭ la „ora tempo" de la „granda landa armeo", kiun partoprenis 40 000 anoj (bojaroj[4], urbanoj, kamparanoj kaj eĉ dungosoldatoj).

Sed la plej fama estis la milita kariero de la princo. Oni diras, ke el siaj multnombraj bataloj li malvenkis nur en du: Kilio (1462, kontraŭ la hungaroj) kaj la Blanka Valo [*Valea Albă (Războieni)*, 1476, kontraŭ la turkoj].

Moldavio havis dum la regado de Stefano la Granda jenajn landlimojn: okcidente - Karpatojn al Hungario, sude - la riverojn Milkovo (*Milcov*) kaj Sireto (*Siret*) al Valakio, Danubo al Dobruĝo (tiam sub otomana regado), norde kaj oriente - Dnestron al Pollando (fakte la Litova Grandduklando) kaj la Krimea Ĥanlando. Kun ĉiuj siaj najbarlandoj la Moldavio de Stefano la Granda havis variajn rilatojn, sed la moldava regnestro zorgis ne havi samtempe du malamikajn najbarojn.

En 1458 la moldava princo agnoskis la malnovajn privilegiojn por la germanaj komercistoj el Braŝovo (germ. *Kronstadt* = hung. *Brassó* = rum. *Braşov*). En la sekvantaj jaroj la rilatoj malboniĝis. La hungara reĝo Mateo (*Matia*) Korven' (1458-1490) apogis la malamikojn de Stefano, dum moldavoj apogis la kontraŭreĝajn ribelojn de sikuloj kaj de la transilvania nobelaro (1465, 1467) kaj malfermis la aferon de Kilio. Tiu civito gardis la elfluejon de Danubo. Ĝin regis valakoj kaj poste moldavoj. En 1448, unu el la moldavaj princoj cedis la civiton al la vojevodo de Transilvanio, Johano Korven' (*János Hunyádi*). En 1462 moldavoj (estrataj de Stefano mem) provis konkeri la civiton, sed ili tion sukcesis nur en 1465. Tial en 1467 organiziĝis milita ekspedicio hungara kontraŭ Moldavio. Granda hungara armeo estrata de la reĝo Mateo Korven' eniris Moldavion, sed ĝin serioze

[4] Bojaroj estis ortodoksaj nobeloj en la slavaj kaj rumanaj landoj. Vd. *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, Paris: S.A.T., 2002, p.163, I-a kolumno.

venkis moldavoj en la batalo de *Baia* (14/15 dec.1467). Tiu „hungara kampanjo finita per plena fiasko estis la lasta granda provo de la hungara krono altrudi sian suverenecon al Moldavio" [5]. Poste, pro la otomana danĝero, la du landoj revenis al pli bonaj rilatoj: en 1472 estis renovigitaj la komercaj privilegioj al Braŝovo kaj, en 1475, similajn privilegiojn ricevis ĉiuj negocistoj de Hungario. 5000 sikuloj apogis la moldavojn kontraŭ la turkoj en 1475 kaj la hungara armeo intervenis en 1476 por helpi la moldavojn venki la armeon de Mahometo la Dua. Jam en 1475 Stefano sin agnoskis vasalo de Mateo Korven' kaj en 1489 li ricevis kiel feŭdojn du civitojn kun iliaj bienoj en Transilvanio (Ĉiĉejo [*Ciceiu*] kaj *Cetatea* de *Baltă*).

Ekde 1456 la moldavaj princoj akceptis pagi tributon al la Turka Imperio por garantii la landan aŭtonomion. Tiun situacion akceptis ankaŭ Stefano la Granda dum siaj unuaj regjaroj. Inter 1470-1481 li provis plurfoje meti sur la tronon de Valakio princojn – *Laiotă Basarab* [*Lajotă* Besarabo], *Vlad Țepeș* [t.e. La Palisumanto[6]], *Basarab* Cepeluŝo [*Țepeluș*], *Vlad Călugărul* [t.e. la Monaĥo] – kiuj akceptu lian kontraŭturkan politikon, sed fine li malsukcesis. Tiuj atakoj kontraŭ Valakio kaj la rifuzo pagi la tributon (post 1471) devigis la otomanajn sultanojn Mahometo la Dua (1451-1481)[7] kaj Bajazeto la Dua (1481-1512) solvi la aferon per la armiloj.

Granda armeo (laŭ Stefano: 120 000 homoj) otomana (en kiu troviĝis ankaŭ valakoj) atakis Moldavion, sed ĝi estis tute detruita en la batalo antaŭ *Vaslui* (la 10-an de januaro 1475) de 40 000 armeanoj (plejparte moldavoj, sed ankaŭ sikuloj, poloj kaj hungaroj). Estis la plej granda el la venkoj de la moldava regnestro kaj ĝi havis grandan eĥon. La pola kronikisto Johano (*Jan*) *Dlugosz* (1414-1480), ĉefepiskopo de Lembergo (hodiaŭ Lvovo), skribis: „Ho, admirinda viro, neniel malsupera al la heroaj dukoj, kiujn ni tiel admiras, kiu dum nia tempo la unua inter la princoj de la mondo akiris tiom gloran venkon kontraŭ la turkoj. Laŭ mia opinio, li estas la plej inda [...] regi la mondon [tiel!] kaj precipe [por] iĝi la estro de la batalo kontraŭ la turkoj kun la kunaj decido kaj konsilo de la kristanoj, ĉar la aliaj kristanaj reĝoj kaj princoj dediĉas sin nur al mallaboremo kaj festenoj aŭ al enlandaj militoj" [8]. Kelkajn tagojn poste Stefano sendis cirkuleran leteron al la reĝo de Hungario kaj la aliaj kristanaj ŝtatestroj, ĉar la sultano Mahometo la Dua „decidis sin venĝi kaj [...] per sia tuta forto veni [...] kontraŭ ni por obeigi nian landon, kiu estas la pordego de la tuta kristanaro, kaj se tiu pordego perdiĝos - Dio nin protektu kontraŭ tio -, [tiam] la tuta kristanaro troviĝos en granda danĝero"[9]. Al tiu urĝa peto, la moldava princo ricevis praktike nenian respondon. Sultano Mahometo la Dua konkeris en 1475 Krimeon kaj alportis sub sian regadon la tieajn tatarojn. La postan jaron, 150 000 turkoj, tataroj kaj valakoj atakis Moldavion. La tatarojn repuŝis la moldava kamparana armeo. Tamen la 26-an de julio 1476, la bojara armeo estrata de la princo mem estis venkita de la turkoj en la Blanka Valo [*Valea Albă*]. Simple kaj elvokive prezentis tiun eventon la surskribo en la kristana preĝejo tie konstruita en 1496: „Leviĝis la potenca imperiestro Mahometo, la turka imperiestro, per ĉiuj siaj fortoj el Oriento, kaj ankaŭ Besarabo-vojevodo, nomata *Laiotă*, venis kun sia tuta besarabia lando [t.e.Valakio]. Kaj venis ili por prirabi kaj konkeri la Moldavan Landon; kaj ili alvenis ĝis tie, ĝis la loko nomata la Blanka Valo. Kaj ni, Stefano vojevodo, kaj nia filo, Aleksandro, eliris antaŭ ili kaj okazis granda milito [t.e. batalo] kontraŭ ili en la monato de julio 26; kaj laŭ la volo de Dio, la kristanojn venkis la paganoj. Kaj falis [tiam] granda nombro da moldavaj batalantoj."[10] Tiu otomana venko tamen montriĝis portempa: ĉiuj moldavaj civitoj

---

[5] *Histoire*, p. 94-95.

[6] Temis pri la fama valaka princo konata en la okcidenta mondo kiel Drakulo.

[7] Konkerinto de Konstantinopolo en 1453.

[8] Rumanlingva traduko en la vol. *„Istoria României în texte"* [„Historio de Rumanio en tekstoj"], kunord. *Bogdan Murgescu, București*, 2001, p.134.

[9] „Letero sendita de Stefano la Granda al la kristanaj princoj post la venko en *Vaslui* – la 25-an de januaro 1475", samloke, p.130-131. Similajn ideojn esprimis la moldava regnestro al la Senato de la Venecia Respubliko: „Mi ne volas diri kiel grava estas por la kristanaj aferoj ĉi tiu lando mia; mi konsideras, ke tio estas evidenta, ĉar ĝi estas la sojlo de Hungario kaj Pollando, kaj defendo de ĉi tiuj du reĝlandoj. Krome, ĉar la turkojn mi malhelpis per batalado dum kvar jaroj, multaj kristanoj restis en paco." – *„Probleme fundamentale ale istoriei Patriei și Partidului Comunist Român. Tematică, bibliografie, crestomație"* [„Fundamentaj problemoj de la historio de la Patrolando kaj de la Rumana Komunista Partio. Temaro, bibliografio, krestomatio"], kunord. *Const. Mocanu, București*, 1981, p.145 kaj 147.

[10] Cit. laŭ: *Florin* CONSTANTINIU, *„O istorie sinceră a poporului român"* [„Sincera historio de la rumana popolo"], *București*, 1997, p.107-108.

rezistis kontraŭ la agresantoj, kiuj samtempe suferis pro malsato kaj soifo, ĉar, laŭ la kutimo, moldavoj detruis ĉiujn grenojn kaj venenis la putojn, dum la loĝantaro kun sia dombestaro retiriĝis en la arbarajn kaj montarajn regionojn. Mahometo la Dua estis mem devigita retiri sian armeon, persekutate de la moldavaj kaj hungaraj soldatoj. Tial oni povas konsideri la tiujaran turkan kampanjon kiel fiaskon.

Post pluraj jaroj da bataloj, la kontraŭturka alianco iom post iom disiĝis: Venecio (1479) kaj Hungario subskribis pacon. La nova sultano Bajazeto la Dua agis firme en la Nigramara Baseno kaj konkeris en julio-aŭgusto 1484 la plej gravajn civitojn de Moldavio: Kilio (ĉe Danubo) kaj Blanka Civito (la hodiaŭa Dnestra Blankurbo), kaj tiel fermis la vojon de la lando al la Nigra Maro kaj ruinigis ties komercon. Tial, jam en 1489, Stefano la Granda rekonis la otomanan suverenecon kaj akceptis ree pagi la tributon (temis pri 5000 oraj dukatoj).

Komence de sia regado, Stefano la Granda agnoskis la suverenecon de la pola reĝo Kazimiro la Kvara (1447-1492) en 1458 (publike en 1485) por akiri helpon kontraŭ siaj malamikoj: unue kontraŭ Hungario kaj poste kontraŭ Turkio; tamen ĉi tiu helpo montriĝis neglektinda. En 1497 la pola reĝo Johano Alberto [*Jan Olbracht*, 1492-1501] decidis ataki Moldavion por tien meti kiel ŝtatestron unu el siaj fratoj. La civita ĉefurbo Suĉavo rezistis kaj la pola armeo estis tute detruita en la bataloj ĉe la Praarbaro de *Kosmen'* kaj Lenceŝto [*Lențești*]. „Kaj okazis granda masakro inter la poloj fare de la moldavaj armeoj kaj pluraj soldatoj tie mortis, kaj ĉiuj grandaj kanonoj per kiuj ili [poloj] bombardis la civiton de Suĉavo estis forprenitaj kaj same aliaj pli malgrandaj kaj multaj malpli gravaj aĵoj, kiujn oni ne povis nombri"[11]. Post du jaroj, pere de la hungara reĝo Ladislao la Dua (1490-1516), estis subskribita pola-moldava pactraktato, kiu ne plu mencias la vasalecon de la moldava princo al la polaj reĝoj. Eĉ dum la lastaj jaroj de Stefano la Granda, la moldava armeo okupis landliman teritorion, kiun la du landoj disputis jam ekde la XIV-a jarcento.

Stefano la Granda mortis la 2-an de julio 1504 en Suĉavo kaj lin „entombigis la popolo kun granda malĝojo kaj plorado en la monaĥejo de *Putna*, kiun li mem konstruigis. Tiom da malĝojo estis, ke ĉiuj ploris kvazaŭ pro sia patro, ĉar ĉiuj ekkomprenis, ke malaperis granda bonfaranto kaj granda defendanto. Eĉ post lia morto, ĝis hodiaŭ, oni nomis lin "*sveti*" (t.e. sankta) Stefano-vojevodo, ne pro la animo, kiu estas en la mano de Dio, ĉar li estis pekema homo, sed pro siaj bravaĵoj, kiujn neniu el [niaj] princoj, nek antaŭe, nek poste, sukcesis superi" [12]. En 1992 la Rumana Ortodoksa Eklezio decidis lin sanktigi, kaj nun li estas oficiale konata en Rumanio kiel „Stefano la Granda kaj Sankta" [13].

[11] *Letopisețul anonim al Moldovei* [„Anonima kroniko de Moldavio"] en *Cronicile slavo-române publicate de Ioan Bogdan* [„La slav-rumanaj kronikoj" publikigitaj de *Ioan Bogdan*], ed. *P.P. Panaitescu, București*, 1959, p.21.



## Resumo

Tiu ĉi artikolo skizas la portreton kaj la farojn de Stefano la Granda (1457-1504), la plej grava el la regnestroj de Moldavio. Per sia personeco li dominis la rumanan historion dum la lasta duono de la XV-a jarcento, kiam li havis rilatojn, ĉu pacajn, ĉu militajn, kun konataj ŝtatestroj kiel Kazimiro la Kvara (reĝo de Pollando, 1447-1492), Mateo Korvin' (reĝo de Hungario, 1458-1490), Mahometo la Dua (sultano de la Otomana Imperio, 1444-1446, 1451-1481) aŭ Ivano la Tria (estro de la Moskva Granda Princlando, 1462-1505). Li postlasis ne nur la famon de siaj venkoj, sed ankaŭ multnombrajn religiajn konstruaĵojn, el kiuj multaj povas esti admirataj ankoraŭ nuntempe.

## Adreso de la aŭtoro

*Doru NEAGU*
*Aleea Policlinicii, Bl.G9, Sc.1, Et.3, Ap.16*
*RO - 6100 B r a i l o*
RUMANIO

<dneagu6100@yahoo.fr> aŭ <doru_neagu@k.ro>

## Priaŭtora informo

La aŭtoro estas diplomito pri historio de la Bukareŝta Universitato kaj jam aperigis kelkajn materialojn en rumanaj esperantlingvaj periodaĵoj.

[12] *Gr.Ureche, „Letopisețul"*, p.64.

[13] *Remus RUS, „Ștefan cel Mare"* [„Stefano la Granda"], aldono en la volumo *„Oxford: Dicționar al sfinților"* [la rum. eld. de la „Oksforda Nomaro de Sanktuloj"], de *Hugh FARMER, București*, 1999, p.486.